

LA ARTIKOLO EN ESPERANTO

L. L. Zamenhof en LINGVAJ RESPONDOJ konsilas (al s-ro L. M. – *Pri la uzado de la artikolo; el decembro 1906*):

„Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzo estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diras «venis tago, kiun mi tiel longe atendis», via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri «la tago»; sed se vi diros «hodiaŭ estas la dimanĉo» anstataŭ «hodiaŭ estas dimanĉo», tiam vi faros rekte eraron, kiu estos malagrabla por la oreloj de ĉiu bona esperantisto.“

En la respondo Zamenhof referencis al logiko de popoloj, kiu konsilas al ni, kiam la artikolon uzi. Sed cirkonstancojn, kiujn malkaŝas al ni la logiko, li tie ne klarigis. Pri la artikolo Zamenhof eldiris koncizan regulon en la § 1 de Fundamenta Gramatiko. Ĝi estas duparta, sed nur la unua parto prezentas logikan bazon:

„Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kajoz kaj nombroj.“

Se Zamenhof limigus la instruon per tiu ĉi simpla kaj logika regulo, ni verŝajne scipovus uzadi la artikolon korekte. Bedaŭrinde li aldonis rimarkon, per kiu li verŝajne volis al ni helpi en konceptado de la afero, sed fakte li per ĝi malfermis la artikol-uzadon al malreguleco kaj mallogikeco. La rimarko tekstas:

„La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj.“

Same li eksplikis la artikolon en la § 27 de Fundamenta Ekzercaro:

La unua parto: „La artikolo «la» estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj.“ La sekvanta frazo tekstas: „Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj.“

En naciaj lingvoj la artikolo foje estas, foje ne estas, kaj reguloj por la uzado en unuopaj lingvoj diferencas. Pro tio la uzado estas neunueca, eĉ ĉe eminentaj aŭtoroj la uzado grave diferencas laŭ frekvenco kaj cirkonstancoj.

La aŭtoroj de Plena analiza gramatiko de Esperanto (PAG) en la § 76-78 la problemon enkondukis bone: „La artikolo estas determinilo, kiu servas por klarigi la frazon, precizigante, ke la priparolato estas konata de la aŭskultanto...“ Plu ili la teorion kaj praktikon senutile komplikis.

En la verko enestas aserto: „Ĝi (la artikolo) indikas, ke la sekvanta substantivo esprimas ulon aŭ aĵon kiel reprezentanton de sia tuta klaso aŭ kategorio, resp. en pluralo la tutajn de la samklasaj uloj aŭ samkategoriaj aĵoj.“ El la zamenhofa instrukcio kaj uzo tio ne rezultas.

Plua instruado de PAG estas: „Ĝi indikas, ke la ulo aŭ aĵo esprimita de la substantivo, estas sola, unika en sia speco (ekz. la suno, la tero).“ Sed en tiu kazo la ulo aŭ aĵo estas konata kaj ne estas necese la eventon formuli kiel specialan punkton.

Ankoraŭ ni sekvu unu specialan instruon de PAG, kiu rilatas al la ad-substantivoj: Oni uzas la artikolon, „kiam la ad-substantivo estas determinita per de-prepozitivo: La hirundoj anoncas la alvenon de printempo.“ Bone, sed tiu ad-substantivo estas difinita (konatigita)

per prepozitivo. En la donita ekzemplo ni povas heziti ĉe la unua artikolo, sed ne ĉe la dua. La aŭtoroj de PAG komprenis hirundojn kiel „*representantojn de sia tuta klaso*“. Sed prave ni povas la artikolon tie ne uzi, ĉar Zamenhof diris, ke „*en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu*.“ La duan artikolon en la frazo ni povas konsideri logika, ĉar ne temas pri nekonata alveno, sed pri la alveno de printempo.

En la detala klasifikado laŭ Kalocsay kaj Waringhien ni vidas malfeliĉan klopodon iel ekspliki la duan parton de la zamenhofs regulo referencanta al „*aliaj lingvoj*“. Antaŭ ne-longe mi legis analizon studaĵon de litovo A. Vaitilavičius, verkita jam en la 1970-aj jaroj, kun kies resumo mi konsentas:

„*Rekomendo de Fundamenta Gramatiko uzi la artikolon same kiel en aliaj lingvoj kaŭzis ĥaŝan situacion. Tial ni devas obei nur la regulon de Fundamenta Ekzercaro, ke la artikolo estas uzata, kiam ni parolas pri objektoj aŭ personoj konataj. Bona konsilo por pruvi neceson de la artikolo estas ĝia anstataŭo per <tiu> aŭ <tiu ĉi>. Grava estas rekomendo de Zamenhof, en dubaj kazoj tute ne uzi la artikolon.*“

Simpla rekomendo povas esti formulita ankaŭ tiel ĉi: Se ni parolas pri iu aŭ io unufoje, la artikolon oni ne uzas. La artikolon oni uzas en la kazo, se oni pri iu aŭ io jam parolis, temas pri **jam** konkreta persono aŭ objekto.

Por la uzantoj de Esperanto tamen estas utile prezenti kelkajn praktikajn konsilojn, kiujn eblas ĉerpi el la jam nomita PAG kaj ankaŭ el bonstila literaturo kaj spertoj de agnoskataj uzantoj de la lingvo. Unue mi formulas la kazojn, kiam ni la artikolon ne uzu:

- a) Se oni povas antaŭmeti al la substantivo la adjektivon *iu, ia, certa, kelkaj, multaj, pluraj*;
- b) post *da, ĉiu, ĉiuj, ambaŭ, kies, ties*;
- c) antaŭ la posedaj adjektivoj *mia, ĝia, nia ktp.*;
- d) antaŭ vokativo;
- e) en proverboj, maksimumoj kaj difinoj;
- f) ĉe la propraj nomoj de personoj, landoj, urboj, maroj, riveroj, montoj, festoj, kiam ili staras solaj kaj per si mem ili estas sufiĉe determinitaj;
- g) antaŭ nomoj de societoj skribitaj per komencaj literoj, ekzemple: *UEA, ĈEA*.

Ankaŭ por uzado ekzistas kelkaj logikaj rekomendoj, kiuj ne estas esceptoj, sed specialaj kazoj, en kiuj oni tamen uzas la artikolon. Ili rilatas precipe al propraj nomoj. Kialo de la rekomendoj estas klopodo eviti miskomprenon. La artikolo tie havas taskon individuigan (norda maro – la Norda Maro; tri cervoj – la [hotelo] Tri Cervoj), ankaŭ taskon montri konatecon (urbo – la urbo Prago) aŭ montri, ke iu nesubstantivo estas uzata „*kiel substantivo*“:

a) Se maro, rivero aŭ monto estas nomataj per individuiga, sed **komunsignifa adjektivo**: *la Ruĝa Maro, la Norda Maro, la Monto Blanka* (sed: *Ĝeneva Lago* – sen artikolo, ĉar „*ĝeneva*“ ne estas komunsignifa).

b) Kiam la festo ne estas nomata per la nomo de la okazintaĵo (*Kristnasko, Ĉieliro de Maria, Ramadano*), sed per la nomo de **rilata detalo** (objekto, persono, dogmo): *la tago / festo de la Tri Reĝoj, de la Mortintoj, la Sankta Silvestro (la tago de Sankta Silvestro), la unua (tago) de majo, ankaŭ en la cifera prezento: la 1-a de majo*.

c) La titoloj de **klasikaj verkoj** regule alprenas la artikolon: *la Eneido, la Biblio, la Korano*, sed la modernaj verkoj preskaŭ neniam.

- d) La orientaj **ĉefdirektoj** alprenas la artikolon: *la sudo, la okcidento*.
- e) Kiam la propraj nomoj estas **akompanataj de epiteto**, oni uzas la artikolon: *la reĝo Salomono, Karolo la kvara, la larĝa Danubo, la urbo Pĝerov, la venonta dimanĉo...*
- f) Kiam nomon de persono (ankaŭ kun honora alnomo s-ro, s-ino, f-ino, d-ro, prof. k.a.) antaŭas **kvalifika adjektivo**: *la genia Zamenhof, la inventema Edison...*
- g) Ĉe la nomoj de ŝipoj, gastejoj, hoteloj k.s., kie la komuna alnomo (ŝipo, gastejo...) estas ordinare **subkomprenata**, oni tamen uzas la artikolon: *li loĝis en la Tri Cervoj...*
- h) Fine la artikolo servas ankaŭ kiel simpla **gramatika ilo**. En tiu rolo ĝia tasko estas montri, ke adjektivo aŭ adverbo estas uzata substantive: *la Ĉiopova; hodiaŭ estas la deksesa de septembro...; la „tuj“ de sinjoroj estas multe da horoj...*, montri, ke propra nomo estas uzata kiel komuna: *li estas la Heraklo de la vilaĝo...*, transformi komparativon en superlativon: *la pli forta el la manoj; kaj absolutan superlativon en la relativan: ŝi estas la plej bela el ĉiuj...*

Jan Werner, Brno 2005-11-17